

Dodatek: Czytanki

W tej części prezentujemy wybór krótkich tekstów pochodzących z książki *Unua Legolibro*, opublikowanej w 1907 roku przez polskiego lekarza-okulistę Kazimierza Beina (1872-1959), wybitnego polskiego esperantystę, tłumacza, przyjaciela Ludwika Zamenhofa, piszącego pod pseudonimem Kabe.

Teksty zostały opatrzone listami trudniejszych wyrazów.

Tito

Tito, la roma imperiestro, rememorante foje vespere, ke dum la tuta tago li faris nenion bonan, diris: "Ho ve, miaj amikoj, mi perdis la tagon."

roma – rzymski; **imperiestro** – cesarz; **rememori** – przypominać sobie; **foje** – kiedyś, pewnego razu; **ho ve** – kurza twarz! kurde! biada! (wykrzyknik)

Filipo Macedona

Kiam oni rakontis al Filipo Macedona, ke multaj atenaj oratoroj kalumnias lin en siaj paroladoj, li diris: "Mi penos pruvi per mia vivo kaj miaj agoj, ke ili estas mensogemuloj."

rakonti – opowiadać; **atena** – ateński; **macedona** – macedoński; **oratoro** – orator, mówca; **kalumnii** – szkalować; **peni** – starać się, usiłować; **mensogemulo** – kłamca

Sokrato

Sokrato salutis junan riĉan homon, kiun li renkontis sur la strato. La riĉulo ne resalutis. La amikoj de Sokrato indignis, sed li diris: „Kial vi tiel koleras? Ke li ne estas tiel afabla, kiel mi?”

Sokrato – Sokrates; **renkonti** – spotykać; **resaluti** – odwzajemnić pozdrowienia; **indigni** – oburzać się; **koleri** – gniewać się; **afabla** – uprzejmy

Polikrato

Polikrato, la tirano de Samoso, donacis al la greka poeto Anakreono grandan sumon da mono. La poeto akceptis kaj tiel maltrankviliĝis pro la oro, ke li ne povis dormi kelkajn noktojn. Tiam li resendis la monon kun la vortoj: „Ĝi ne valoras la maltrankvilon, kiun ĝi kaŭzas al mi.”

maltrankviliĝi – martwić się; **oro** – złoto; **resendi** – odesłać; **valori** – być
maltrankvilo - niepokój

Naiveco

Knabino sesjara havis katon kaj pupon. Iu demandis ŝin, kiun el la du ŝi preferas. Ŝi ne volis respondi, fine ŝi diris al li en la oreleon "Mi preferas mian katon, sed ne diru, mi petas vin, tion al mia pupo."

naiveco – naiwność; **pupo** – lalka; **orelo** – ucho

Milton

Karlo la II-a kaj lia frato Jakobo venis al Milton por riproĉi lin, superŝutis lin per insultoj kaj finis per la la vortoj: "Fripono, via blindeco estas puno de l'sorto pro viaj pekoj." La respektinda bardo respondis: "Se la sorto punis min per blindeco pro miaj pekoj, kiaj estis la pekoj de via patro, kiu estis punita per morto!"

riproĉi – ganić, strofować; **superŝuti** – obsypywać; **insulto** – obelga; **fripono** - łotr;
respektinda - czcigodny; **bardo** - wieszcz, bard; **puni** - karać; **peko** - grzech

Varma pluvo

Du kamparanoj parolis pri la bela vetero, favora por la tritiko, antaŭ nelonge semita de ili. "Se la varmaj pluvoj daŭros — diris unu — ĉio eliros el la tero." — „Kion vi babilas — diras la alia — mi havas du edzinojn en la tombejo; mi timas, ke ili revenos al mi.”

kampanano - wieśniak, chłop; **tritiko** - pszenica; **semi** - siać, zasiewać; **eliri** - wychodzić; **tombejo** - cmentarz

Ŝparema kanceliero

Kiam Morus, la kanceliero de Anglujo, estis en malliberejo, kaj oni iutage volis fortondi lian longan barbon, li forsendis la barbiston dirante: "La reĝo kaj mi procesas pri mia kapo, mi ne faros elspezojn por mia barbo pli frue, ol mi scios, kiu havos la kapon."

ŝparema – oszczędny; **kanceliero** - kanclerz; **malliberejo** - więzienie; **iutage** - kóregoś dnia; **fortondi** - odcinać, strzyc; **barbo** - broda; **forsendi** – odprawiać, odsyłać; **barbisto** (= **frizisto**) - fryzjer; **elspezo** - wydatek

Reĝo, komercisto aŭ buĉisto

Malek, la veziro de l' kalifo Mustafa, venkis grekojn kaj kaptis ilian reĝon. Li ordonis konduki la kaptiton en sian tendon kaj demandis, kion li atendas de la venkinto. La reĝo respondis: "Se vi faras la militon kiel reĝo, donacu al mi la liberecon; se vi faras ĝin kiel komercisto, vendu min; se vi faras ĝin kiel buĉisto, ordonu mortigi min." La turka militestro donacis al li la liberecon.

komercisto – handlarz; **buĉisto** - rzeźnik; **veziro** - wezyr; **kalifo** - kalif; **greko** - Grek; **kapti** - chwycić; **ordoni** - polecać, kazać; **kaptito** - schwytany; **tendo** - namiot; **atendi** - oczekiwać; **donaci** - podarować; **mortigi** - zabijać; **militestro** - dowódca; **libereco** - wolność

Al kio oni povas kutimi

Pastro vidis kampananinon, senhaŭtigantan angilojn. "Kiel vi povas esti tiel kruela — diris li al ŝi —, ĉu vi ne komprenas, ke la malfeliĉaj bestoj suferas?" — "Ah — respondis ŝi —, mi faras tion jam de dudek jaroj, kaj nun ili sendube tute kutimis al ĉio."

pastro – ksiądz, duchowny; **kampanano** - chłopka, wieśniaczka; **senhaŭtigi** - odzierać ze skóry; **angilo** - węgorz; **kruela** - okrutny; **sufери** - cierpieć; **kutimi** - być przyzwyczajonym

La grafo de Grance

Kiam la grafo de Grance estis vundita per kuglo en la genuo, la ĥirurgiistoj faris tranĉojn, por trovi la plumbon. Fine perdante la paciencon, la grafo demandis, kial ili tiel turmentas lin. "Ni serĉas la kuglon" — diris ili. "Kial vi ne diris tion pli frue — ekkriis la grafo — mi havas ĝin en la poŝo."

grafo - graf; **vundi** - raniĉi; **kuglo** - kula, pocisk; **genuo** - kolano; **tranĉo** - ciĉie; **plumbo** - ołów; **perdi** - traciĉi; **pacienco** - cierpliwość; **turmenti** - męczyĉ, dręczyĉ; **ekkrii** - zakrzyknaĉ; **poŝo** - kieszeń

Dek konsiloj de Jefferson por la praktika vivo

1. Prokrastu neniam ĝis morgaŭ, kion vi povas fari hodiaŭ.
2. Ne trudu al alia persono laboron, kiun vi mem povas plenumi.
3. Ne elspezu monon pli frue, ol ĝin vi posedas.
4. Aĉetu neniam tion, kion vi ne bezonas.
5. Evitu la fieron, ĝi malutilos vin pli multe, ol la malsato, soifo kaj malvarmo.
6. Neniam bedaŭru, ke tro malmulte vi manĝis.
7. Kion vi faras, faru volonte.
8. Ne maltrankviliĝu pri la malbonoj, kiuj okazos neniam.
9. Rigardu la aferojn ĉiam de ilia bona flanko.
10. Kiam vi koleras, kalkulu ĝis dek, antaŭ kiam vi parolos; se vi estas tre kolera, kalkulu ĝis cent.

konsilo - rada; **prokrasti** - odraczaĉ, odwlekaĉ; **trudi** - narzucaĉ; **plenumi** - wypełniaĉ, wykonywaĉ; **elspezi** - wydawaĉ; **posedi** - posiadaĉ; **fiero** - дума, chluba; **malutili** - szkodziĉ; **malsato** - głód, **soifo** - pragnienie; **maltrankviliĝi** - niepokoić się; **rigardi** - patrzeĉ, oglądaĉ; **flanko** - strona; **koleri** - złościć się, gniewać się

Kiu li estis?

Juna homo estis iam en malliberejo, kaj malpermesite estis al iu ajn viziti lin ekster liaj parencoj. Foje maljunulo venis en la maliiberejon kaj volis vidi la junan homon.

— Ĉu vi estas parenco de la malliberulo? — demandis la gardisto, — oni ne enlasas fremdulojn.

— Jes — respondis la maljuna homo.

— Kiu do vi estas?

— Aŭskultu, mi diros tion al vi: mi havas nek fratojn, nek fratinojn, sed la patro de la junulo estas filo de mia patro.

malliberejo - więzienie; **malpermesi** - zabraniać, zakazywać; **parencoj** - krewni; **gardisto** - strażnik, dozorca; **enlasi** - wpuszczać; **fremdulo** - obcy

Seruristo anstataŭ forĝisto

Forĝisto de vilaĝo mortigis homon kaj estis kondamnita al pendigo. La kamparanoj petegis la juĝiston pardoni la forĝiston, ĉar la vilaĝo nepre bezonas lin.

— Kiel mi plenumos mian devon de l'justeco? — demandis la juĝisto.

— Sinjoro — respondis kamparano — ni havas du seruristojn, kaj por tiel malgranda vilaĝo unu sufiĉas, pendigu la alian.

seruristo - ślusarz; **forĝisto** - kowal; **kondamni** - skazywać; **pendigo** - powieszenie; **nepre** - koniecznie; **plenumi** - wypełniać, wykonywać; **justeco** - sprawiedliwość; **juĝisto** - sędzia

Tri musoj

Superstiĉa princo vidis foje en sonĝo tri musojn grasan, malgrasan kaj blindan. La princo demandis diveniston, kiu jene klarigis la sonĝon: "La grasa muso estas via ministro, la malgrasa estas via popolo, kaj la blinda estas via portreto, mia princo."

muso - mysz; **superstiĉa** - przesądny; **princo** - książę; **foje** - pewnego razu; **sonĝo** - sen; **blinda** - ślepy, niewidomy; **divenisto** - wróżbita, prorok

Eraro kaj korekto

Juna homo sidis en loĝio kun la lordo North, kiun li ne konis, kaj komencis interparoladon. Du sinjorinoj eniris la kontraŭan loĝion.

— Ĉu vi ne povas diri al mi — demandis la junulo —, kiu estas la malbela maljuna virino, kiu ĵus eniris?

— Jes — respondis la lordo North kun gaja mieno —, mi povas diri al vi, tio estas mia edzino.

— Mi petas vian pardonon — balbutis la ruĝiĝinta junulo —, mi ne demandis pri ŝi, mi demandis pri la terura monstro, kiu estas kun ŝi.

— Tio estas mia filino — respondis ridetante la lordo.

eraro - błąd; **korekto** – poprawka; **loĝio** - loża; **eniri** - wchodzić; **ĵus** - właśnie, dopiero co; **gaja** - wesoły; **mieno** - mina, wyraz twarzy; **balbuti** - bełkotać; **ruĝiĝi** - rumieniść się; **terura** - straszny; **monstro** - monstruum, potwór

Riĉuloj kaj scienculoj

Riĉa vantulo demandis scienculon:

— Kial oni ofte vidas literaturistojn kaj scienculojn en la domoj de l'riĉuloj, sed malofte riĉulojn en la hejmoj de l'scienculoj?

— Ĉar la saĝaj homoj — respondis li — konas la valoron de la riĉeco kaj la riĉaj ofte ne komprenas la valoron de l'saĝeco.

riĉulo – bogacz; **scienculo** - uczoney; **vantulo** – próżniak, chełpliwiec; **literaturisto** – literat; **malofte** - rzadko; **saĝa** – mądry